EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO
MEZA

Celo
Konfirmo pri la kapableco sufiĉagrade parole kaj skribe interkompreniĝi en Esperanto

Kotizo
Baza kotizo: 30 EUR

La bazan kotizon pagas kandidatoj, kiuj ne estas membroj de germanaj Esperanto-organizoj.

Membra kotizo: 15 EUR

La membran kotizon pagas kandidatoj, kiuj estas membroj de germanaj Esperanto-organizoj.

Rabata kotizo: 8 EUR

La rabatan kotizon pagas kandidatoj, kiuj estas membroj de germanaj Esperanto-organizoj kaj studentoj ne pli ol 25-jaraĝaj. Ankaŭ eksterlandaj kandidatoj pagas € 8,00.

Nemembra rabato: 15 EUR

La nemembran rabaton ricevas kandidatoj, kiuj estas studentoj ne pli ol 25- jaraĝaj aŭ eksterlandaj kandidatoj sed ne membroj de germanaj Esperanto-organizoj.

Ekzistas du alternativaj modeloj:

Dulingva Ekzameno pri Lingva Kapableco

I. Skriba (1:45)

1. traduko Esperanto – Germanen simpla; 30-minuta
2. traduko Germana – Esperanten simpla; 30-minuta
3. eseeto pri unu el tri elekteblaj temoj; 45-minuta

II. Parola (20 minuta)

1. konversacio pri temo de la ĉiutaga vivo
2. interpretado de simpla konversacio en Esperanto inter la ekzamenantoj en la germanan
3. respondado en Esperanto al kelkaj simplaj demandoj pri Esperanto kaj la hodiaŭa movado.

Unulingva Ekzameno pri Lingva Kapableco

I. Skriba (1:45)

1. sencoplena kompletigo de teksto, en kiu vortoj mankas; simpla; 15-minuta
2. kritika komentado pri difinitaj punktoj de antaŭmetita teksto; 45-minuta
3. eseeto pri unu el tri elekteblaj temoj; 45-minuta

II. Parola (20-minuta)

1. konversacio pri temo de la ĉiutaga vivo; 5-minuta
2. difinado de kelke da ĉiutagaj vortoj; 5-minuta
3. respondado en Esperanto al kelkaj simplaj demandoj pri Esperanto kaj la hodiaŭa movado; 10-minuta